

La Riverego *kebekia esperantista bulteno*

Decembro 2005

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 20, No 82

La rencontre automnale en sol espérantiste

Vincent Riendeau

Sans être préparé, je vois l'homme qui s'approche de son ordinateur et qui active je ne sais quel appareil. Le silence plane, on entend les respirations. Le bois craque dans nos oreilles. Personne ne bouge. On eût dit que le cœur de chaque être humain présent dans cette salle s'était arrêté. Un applaudissement incertain, mais généralisé. Que vient-il de se passer?

On a souvent – malgré nous – une opinion assez arrêtée à propos des États-Unis et de l'« Américain » moyen. L'anti-américanisme connaît même, oserais-je dire, une apogée sinon son paroxysme en ce moment même. Mais qu'en est-il vraiment? La rencontre espérantiste automnale m'a, cette année, ouvert les yeux à ce sujet.

Notre arrivée s'est déroulée sans heurt dans un petit village côtier du Lac George. Ainsi, un accueil

très chaleureux dans un paysage qui, malgré les caprices de Dame Nature, a su nous enchanter et nous convaincre d'y revenir l'année suivante. Les congressistes ont commencé à arriver, lentement mais sûrement. Quant à moi, ni le paysage ni le confort des installations n'ont suffi à me convaincre d'y retourner...

*Des
États-Uniens
en majorité...*

Sans être préparé, je vois l'homme qui s'approche de son ordinateur et qui active je ne sais quel appareil. Le silence plane, on entend les respirations. Le bois craque dans nos oreilles. Personne ne bouge. On eût dit que le cœur de chaque être humain présent dans cette salle s'était arrêté. Un applaudissement incertain, mais généralisé. Que vient-il de se passer?

On vient d'assister à une merveille. Une présentation d'un court diaporama à propos de la guerre. Des cercueils, malheureusement trop pleins, recouverts de drapeaux états-uniens, et un homme qui lit de sages paroles.

Ses propos, dont je n'ai pas le souvenir exact, étaient à la fois une déclaration de paix et une demande de pardon, du moins c'est ce que j'en ai ressenti. Incompréhension, désespoir et frustration de s'être fait embarquer dans cette galère; l'homme en était assiégé et voulait nous le faire comprendre.

La salle ne respirait simplement plus pendant ces simples secondes qui m'apparurent une éternité, éternité qui dure et perdure dans l'esprit de chacun qui assisté à cette scène.

Le second homme m'a parlé, en français, en espéranto mais aussi en anglais et en espagnol. Il pouvait facilement parler les quatre langues, sans accent, sans problème, avec passion. Le troisième m'a parlé de mon pays, qu'il connaissait très bien et le quatrième de ma patrie, qu'il connaissait encore mieux.

Et mes préjugés. Mes préjugés, naguère trop forts – hélas!

Tombèrent... Moururent...

Le mot en espéranto

Sylvain Auclair

Dans mes activités espérantistes, je remarque souvent que même les plus actifs parmi nos membres ont de la difficulté avec le concept de mot en espéranto. Entendons-nous bien: on peut en espéranto combiner presque à sa guise des éléments pour former les mots qu'on veut, mais il y a certaines règles à respecter.

Ce qu'il faut toujours se rappeler, c'est que, quand on combine des éléments, on crée **un** nouveau mot. Notre création s'écrira donc en **un seul mot** (avec ou non des traits d'union, au choix) et ne prendra la marque de l'accusatif et du pluriel, au besoin, qu'à la toute fin.

Par exemple, un club d'espéranto, ce sera *Esperanto-klubo*, *Esperantoklubo* ou encore

Esperantklubo. Pas question de simplement juxtaposer les deux mots: *Esperanto-Klubo*, qui se traduirait pas *espéranto club*, qui ne veut rien dire. De la même manière, on ne peut pas dire, comme l'anglais le fait souvent: *Montrealo Esperanto Klubo*, qui signifierait: *Montréal espéranto club*, mais bien *Montreala Esperanto-Klubo*, ou *Esperantista Klubo de Montrealo*, ou... À l'accusatif, on dira *Montrealan Esperanto-Klubon*, ou *Esperantistan Klubon de Montrealo*. Quant au pluriel, on peut toujours rêver...

D'autres questions se posent quand on veut intégrer un nombre ou une préposition dans une construction. Par exemple, il faut savoir distinguer *trimonataj revuoj* et *tri monataj revuoj*. Dans le premier cas, on parle de revues trimestrielles, et dans le second, de trois revues mensuelles...

Les prépositions me semblent particulièrement traîtresses. On fabrique souvent des adverbes qui remplacent des constructions jugées plus lourdes. Dans ma correspondance électronique, je retrouve le sempiternel *Pour votre information*. On peut très bien écrire: *Por via informo*, mais on préfère souvent *porinforme*. Attention, cette dernière forme est bel et bien un seul mot. On ne peut pas écrire *por-informe*, parce que les prépositions se doivent d'introduire un nom, pas un adverbe. De la même manière, on écrira *la revuo aperas trimonate*, ou bien *tiurilate* ou *tiurilata*, qui signifient *à ce propos*. Par exemple: *Mi skribas al vi tiurilate, en la tiurilata teksto: je vous écris à ce propos, dans le texte qui traite ce sujet...*

Bonne création de mots, et sans maux de tête!



Société québécoise d'espéranto
Esperanto-Societo Kebekia

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Rédaction : Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Normand Fleury (président), Martin Benoit (vice-président), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (trésorier) et Vincent Riendeau (conseiller) .

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Redaktado: Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Normand Fleury (prezidanto), Martin Benoit (viceprezidanto), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Vincent Riendeau (konsilanto).

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2006.02.20

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

La Zamenhof strato

Zdravka Metz

En Varsovio ekzistas unu strato kiu tiel nomiĝas. Ĝi estas la strato en kiu, iam ĉe numero 9 vivis kaj kuracis D-ro Zamehof kaj 50 jarojn poste, en rekonstruita strato ricevis logejon ĉe numero 8 Ludoviko Kristoforo Zaleski Zamenhof

La Zamenhof strato – estas la libro skribita kiel interparoladoj inter s-ro Zaleski Zamenhof, ni nomu lin la Nepo kaj ĵurnalisto Roman Bobrzynski, ni nomu lin la Ĵurnalisto.

La interparolado daŭris 8 jarojn por pola versio kaj 10 jarojn por esperanta versio de la libro kiu konincidas kun 100-jara jubileo de esperanto, kiam oni komencis organizi kongreson en Varsovio. La ideon por la libro havis tiama pola prezidanto Sejmo Roman Malinowski, kiun vizitis la Nepo kaj la Ĵurnalisto. Ili volis ke li estu honora aŭspicianto de kongreso en Varsovio 1987. Ili ĉiuj estis amikoj kaj la prezidanto montris ĵus eldonitan libron kiu temis pri li kaj politikaj situacioj en Pollando. Aŭskultante pri la Nepo la prezidanto diris al la Nepo ke li nepre devus skribi pri siaj spertoj.

La Nepo rifuzis dirante ke li estas inĝeniero kaj ne skribisto. La prezidanto proponis ke la Ĵurnalisto notu kaj la Nepo rakontu. Sed la nepo ne

akceptis.

La Nepo vivis en Parizo sed ofte vizitis Pollandon. Dum unu renkontiĝo kun la Ĵurnalisto li menciis ke eble la prezidanto pravis kaj ke nun li pretus kunlabori.

En 1993, la Ĵurnalisto planis ripozon en fama litovia kuracejo Druskininkai. Li invitis la Nepon ke li venu tie por ripozi kaj babili. Tie iam D-ro Zamenhof havis sian unuan klinikon kaj tie iam estis la Nepo kun siaj gepatroj kiuj ja estis kuracistoj. Do, la Nepo akceptis kaj tiel ekis la longa interparolado.

La Ĵurnalisto notis faktojn. Poste ili du havis ankoraŭ plurajn okazojn kune vojaĝi kaj daŭrigi rakontadojn. Kutime antaŭ la interparolado, la Ĵurnalisto telefone interkonsentis pri la temoj, faktoj kaj klarigoj. Li ankaŭ proponis skizajn versiojn kaj sendis ĉion al la Nepo kiu korektis la enhavon kaj la formon. Ne ĉiam ili povis konsenti pri korektajoj sed daŭrigis diskutadi ĝis ili ambaŭ ne samopiniis. La Ĵurnalisto uzis ankaŭ dokumentojn de pola televido liu registris plurajn paroladojn de la Nepo. Li uzis registraĵojn, citis paroladojn de D-ro Zamenhof el la libroj, au citis liajn leterojn al siaj amikoj, hodiaŭ konataj esperantistoj.

La Ĵurnalisto vere volis skribi la

libron pri la Nepo kaj ne pri la Avo. Li volis montri la Nepon kiel: intelektulo, inĝeniero, humanisto, konstruanto de pontoj kaj insuloj kaj samtempe la personon tre sprita kaj spirita. Tamen li volis uzi eblecon ke la libro estu samtempe informilo por larĝa publiko.

Por la Ĵurnalisto la Zamenhof strato estas la naŭa libro en la pola lingvo kaj ĝi havis grandan sukceson. Li malkovras faktojn nekonatajn pri familio Zamenhof, sed enhavas multe da polaj temoj. La Ĵurnalisto kaj la Nepo aŭskultadis publikon, iliajn komentojn au kritikojn, certajn ĉapitrojn ŝanĝis kaj ili du daŭrigis interparoladojn du pliajn jarojn.

La Zamenhof strato en esperanto estas la deka libro de la Ĵurnalisto kaj samtempe la unua libro en esperanto. Certajn polajn temojn ili forprenis kaj aldonis plurajn internacie pli interesajn temojn. Tiu esperanta versio malsamas

« La Zamenhofa strato » estas plena de: temoj, historiaj au familiaj faktoj, nomoj, citaĵoj, numeroj. Pro uzitaj dokumentoj aperas ĉe la fino la bibliografio por ke la leganto povu pliprofundigi la konojn pri iu temo.

La Zamenhof strato

Kiam vi legas la libron, vi

La Zamenhofa strato (sekvo)

Zdravka Metz

kvazaŭe promenas tra pasinteco, nuntempo kaj futuro.

Pasinteco estas la tempo kiam vivis D-ro Zamenhof, vi ekscias ĉu li estis Polo, Ruso, Litvano aŭ Judo, al kiu Zamenhof donacis duonon de la financa donaco Zilbernik, kial esperantistoj en Francio 1905 estis kontentaj ke la publiko ne ekscis ke Zamenhof estas judo, kial Zamenhof ne prezentis en Svislando sian ideon pri homaranismo kaj kio ĝi fakte estas, kiu instruis esperanton al la Nepo. Same vi travivas la tempon de dua mondmilito en Varsovio kaj ĝia geto, vi ekscias kiel sukcesis savi sin la Nepo, de kie venas nomo Zaleski, kial Germanoj akceptis lian simple

polan identecon?

Nuntempo – pri nunaj universalaj kongresoj kaj lingvaj problemoj en la mondo, pri Babela turo kiu pli kaj pli evidentiĝas en Eŭropa Komunumo, pri protektado de la bestoj en Usono kiuj pli gravas ol infanoj, pri fanatismo – ĉu religia aŭ lingva kiu malhelpas al iu ajn movado, terorismo, konstruado de pontoj, tuneloj kaj artaj insuloj.

Futuro – ĉu Zamenhof kaj Esperanto (du asteroidoj kiuj cirkaŭas en universo), renkontiĝos en la jaro 2026, internacia lingvo en la estonto.

La genieco de D-ro Zamenhof kaj lia larĝa kulturo kaj kono kvazaŭ transiris al la Nepo kiu

laŭ sia universaleco tre similas al la Avo.

Samtempe hodiaŭ nomata la Nepo en esperanto movado, ja estas la avo en sia familio.

La Zamenhof strato plenas de informoj: monde historiaj, politikaj, geografiaj, lingvistikaj. La Zamenhof strato plenas ankaŭ de emocioj. Ĝuste la detalaj priskriboj de certaj momentoj plenigas vin ankaŭ emocie kaj kiam vi komencas legi la libron vi kvazaŭe ne povas ĉesi, aŭ se vi interrompas la legadon pro la telefono, nokto aŭ laboro, poste vi serĉas la okazon rapide reveni al la legado.

Kaj kiam vi finas legi la libron, vi emas relegi, revidi certajn respondojn aŭ eĉ ĉapitron por pli profunde enplanti la faktojn.

Pri ARE 2005

Boris-Antoine Legault

Esperanta kulturo estas ia-sence miksaĵo de tradicioj kaj antaŭenirisimo. Ĝi strebas al aktiva konservado de tiuj tradicioj kiuj formas la identecojn popolajn, kaj samtempe ĝi estas moderna ilo por kunkreadi buntan porpacan kulturon. Eble ne nur koincide, la ĉi-jara ARE-renkontiĝo bone spegulis tiun Esperantan plurflankecon.

ARE-renkontiĝe, ekzemplo tradi-

cia estis la kutimaj interkonatiĝaj ludoj. Kiel ĉiujare tiuj vere ekigis la kunvenon, malstreĉigis la etoson kaj ebligis al ĉiuj konatiĝi kun pluraj partoprenantoj. Rilate al novaj ARE-aj programeroj, menciendas la librecoj, ĉi-jara « Metz-Fleury »-a elpensado kiu interesigis multajn homojn, kaj cetere furorigis postan surlokan vendadon de pluraj el la prezentitaj libroj. Alispecan ekvilibron oni ankaŭ trovis en la interesaj prelegoj pri la islanda « Sagao de Njal » (verkita antaŭ multaj jarcentoj), la zamenhofa reform-

La Zamenhof strato estas la libro kiun vi emas kompari kun trinkebla, bongusta akvo. Vi ĝuas ĝin dum vi soifas kaj simple trinkas.

Mi diru ke mi legis la kroatan tradukon ĉar mi aĉetis ĝin dum la inaŭguro de tiu libro. La Ĵurnalisto, Roman Dobrzynski ĉeestis kaj ni konatiĝis. Mi renkontis ankaŭ la Nepon en Zagrebo dum UK kaj tiel konante ilin du, foje dum mi legis la libron, mi havis la impreson ke mi sidas apud ili kaj aŭskultas iliajn pridiskutojn.

Pri ARE 2005 (sekvo)

Boris-Antoine Legault

projekto, kaj la daŭre ekestanta tutmonda Esperanta kulturo. Sed plej agraba por mi ĉi-jare estis la kultura vespero, kies eroj estis ĉiuj tre profesie prezentitaj. Oni ĉerpis temojn tradiciajn el diversaj kulturoj (interalie hajkoverkado kaj kantado de kristanaj kantoj), sed ankaŭ modernajn, ekzemple en «Gardu vin de ĉinologoj», amuza teatra verko de kanada Esperantistino. Eĉ la tre grava temo de malsaneca milito estis traktita profunde same kiel arte. Finfine, mi informu pri tiu

sennoma sabatvespera ludo kiun ni kuntradukis Esperanten kaj kiu poste amuzigadis nin ĝis la dua horo matene. He! Solidareca kunlaboro kaj kunĝuado de la laborrezultoj ankaŭ estas partoj de la Esperanta idearo, ĉu ne?

Unu semajnon antaŭ la ARE-renkontiĝo, mi (sensukcese) invitis kelkajn el la Montrealaj Esperanto-komencantoj partopreni la Esperantistan semajnfiron, kvankam mi mem estis netute konvinkita pri la taŭgeco inviti ilin. Mi dubis kaj timetis. Ĉu la loko estos oportuna? Ĉu la programeroj estos interesaj? Ĉu

entute partoprenos iuj? Alivorte, ĉu tiu okazontaĵo plifervorigus la novajn Esperantemulojn, aŭ ĉu male ĝi estus ne nur ilia unua, sed ankaŭ lasta Esperanta renkontiĝo...? Sed dum reira veturado el la Arĝenta golfeto (Silver Bay) Montrealen, mi morda-dis miajn fingrojn, bedaŭrante ke mi ne kvazaŭtrudis ĉiujn miajn Esperanto-amikojn en la semajnfinan Esperantujon. ARE 2005 naskis neniujn kabeontojn. Male, mi ja povas aserti ke nia aŭtuna renkontiĝo estis tre granda sukceso kaj vigligis la tutan regionan esperantistaron, ĝis almenaŭ ARE 2006!



Partoprenantoj de ARE-2005 en Silver Bay

Internacia Televido

Martin Benoit

Ekde la 5-a de novembro, oni povas spekti televidon en esperanto pere de sia komputilo! La Internacia Televido (www.internacia.tv), kiun iniciatis Flavio Rebelo, elsendas nun programojn 24-horojn tage, 7-tagojn semajne.

La televido elsendas programojn kiuj ŝanĝiĝas ĉiusemajne. Ĉiutage, oni elsendas tri programojn kiuj ripetiĝas dum la tago. Entute, oni povas spekti ses programojn profesie faritajn pri diversaj temoj kiel kurso de esperanto, dokumentarioj, filmoj, kaj amuzaj videoj. Baldaŭ oni povos spekti teleĵurnalon, porinfanajn movbildojn, intervjuojn, teatraĵojn kaj spektaklojn. Por spekti Internacian Televidon, oni bezonas komputilon kun rapida interreta konekto, kaj programon kiel Windows Player por kapti la elsendojn.

Flavio Rebelo, brazilano kaj fondinto de la retportalo Ĝangalo (www.gxangalo.com) komencis revii pri la realiĝo de la unua esperanta reta televidkanalo ekde jam tri jaroj. Li prezentis la projekton al la tuta esperantistaro por kolekti la bezonatan sumon por lanĉi ĝin, kiu estas 35,000 €. Li eĉ prelegis plurfoje en Eŭropo komence de 2004 por diskonigi la projekton al eŭropaj esperantistoj, kaj peti

mondonadojn plie.

Vidante poste ke la projekto nur atingos malpli da mono ol bezonite, sinjoro Rebelo proponis pli modestan projekton: 90-minutaj tagtabelo anstataŭ 240-minutaj, 6 programoj anstataŭ 11, kaj buĝeto de 24 000 €. Kiam tiun sumon la projekto atingis eke de novembro, ĝi estis lanĉita al la tuta mondo!

Kiam mi eksciis kaj mi ekrigardis Internacian Televidon, mi ekĝojegis. Jam dum du jaroj mi aŭdis pri ĝi kaj mi vidas la projekton evolui, necertante ĉu ĝi sukcesos. Dum la prelegoj en Eŭropo, Sinjoro Rebelo prezentis vinjetojn, profesie faritajn, kaj tio pruvis al mi ke la iniciato seriozas. Antaŭ 2 monatoj, oni testis la elsendojn de la retejo. Kaj nun, estas veraj programoj kiuj estas vere interesaj kaj profesie muntitaj. Mi spektis la zagreban kaj la adelaidan UEA-kongresojn, mi lernis pri la fajra festivalo de Valencio, mi rigardis la kurson de esperanto, kaj mi ridis je amuzaj videoj.

Ni, esperantistoj, estas ligitaj per unu lingvo, renkontiĝante en kunvenoj kaj kongresoj, korespondante poŝte, farante retpaĝojn kaj retbabilante. Nun, ni povas spekti televidon en nia lingvo. Kia potenca ilo por disvastigi nian kulturon, por informiĝi pri nia movado kaj por varbi. Post la lanĉo de Internacia Televido, pluraj neesperantaj

retgazetoj pritraktis la lanĉon de la unua esperanta rettelevido. Kaj eĉ en franca teleĵurnalo aperis raporton pri ITV, laŭ tre pozitiva maniero.

Laŭ diroj de Flavio Rebelo: « Se ni revas sole, revo restas nur revo. Se ni revas kune, revo iĝas realo. » Sinjoro Rebelo kaj lia teamo tre bone sukcesis la lanĉon de ITV. Mi ne dubas ke ili ŝvite kontinuos sian laboron por doni al la esperantistoj altkvalitan televidon. Ankaŭ esperantistoj havas sian komunan revon, paco kaj interkompreno inter popoloj uzante komunan lingvon. Ju pli da homoj revante pri tiu fina venko, des pli tiu revo iĝos

Nova estraro

La nova estraro de la esperanto-societo kebekia (ESK) por la periodo septembro 2005 ĝis septembro 2007 estis elektita okaze de la jara kunsido en la 9a de septembro 2005, kaj la postenoj distribuiĝis dum la sekva estrarkunsido, en la 10a de oktobro 2005. La nova estraro konsistas el: Normand Fleury, prezidanto; Martin Benoit, vicprezidanto; Sylvain Auclair, kasisto; Boris-Antoine Legault, sekretario; kaj Vincent Riendeau, konsilanto. Neestraraj helpantoj estas Jérôme Frédéric Bouchard, ĉefredaktisto de « La Riverego » kaj Jessy LaPointe, korektanto de interretaj kursoj.

Le nouveau conseil d'administration de la... (suite p. 9)

Ekonomika analizo malkonsilas la anglan

Hector Alos

La profesoro de la Ĝeneva Universitato kaj specialisto pri lingvoekonomiko François Grin publikigis ampleksan dosieron, kie li analizas la lingvan politikon de Eŭropa Unio. La studon petis kaj eldonis la Alta Konsilio pri Taksado de la Lernejo, franca publika organizaĵo aŭtonoma, kiu taksas kaj analizas la staton de instruado en Francio.

La informo starigas la demandon, kiu estus la optimuma elekto pri la laborlingvoj en Eŭropa Unio. Por tion fari, ĝi studas la nunan situacion kaj konkludas, ke la enspezoj, kiujn Britio ricevas de la superregado de la angla en la mondo, kaj ankaŭ en Eŭropa Unio, estas po 17-18 miliardoj da eŭroj jare, t.e. 1% de ĝia malneta nacia produkto. Tiunkvanton ĝi ricevas el la vendado de libroj kaj de aliaj varoj ligitaj al la angla lingvo kaj el la 700 000 homoj ĉiujare vizitantaj Anglion por lerni la lingvon, krom ankaŭ el la ŝparoj devenantaj de la neglektado de la fremdlingva instruado en la britaj lernejoj. Ne temas pri la tuto de la ekonomiaj transpagoj al la Unuiĝinta Reĝlando pro lingvaj kaŭzoj, sed pri 75 % el ili, kion la aŭtoro estimas kiel frukton de la hegemonio de la angla kaj ne nur de la demografia pezo de la lingvo mem. El tio rezultas, ke ĉiu el el 280 milionoj da ne-

anglalingvanoj de la Unio jare subvencias per 65 eŭroj la britan ekonomion.

Kvankam tiuj nombroj estis jam publikaj inter specialistoj, mankis analizo, ĉu tiuj kostoj estus pli malaltaj, se oni elektus aliajn eblecojn, kiel tiujn, kiujn la laboraĵo formulas. Per la plilarĝigo de la Komunumo al 25 landoj en la pasinta jaro, la oficialaj lingvoj leviĝis de 11 al 20, kaj fariĝis 21 per la ĵusa akcepto de la irlanda – sed ne de la kataluna. Tio starigas dubojn pri la egaleca politiko inter la ŝtataj lingvoj de Eŭropa Unio, establita en la tempo de ĝia fondo, kiam ili estis nur kvar, kaj pensigas pri sistemo kun unu aŭ kun malgranda grupo de laborlingvoj, kiu iom post iom ŝajne sin trudas.

La svisa ekonomikisto proponas komparon inter tri eblaj scenejoj: la angla kiel sola lingvo, trilingveco angla-germana-franca kaj la elekto de esperanto kiel interna laborlingvo en la uniaj organoj. La unua ebleco pligrandigus la ekonomiajn transpagojn al la anglosaksaj landoj. Male, la studaĵo konkludas, ke la trilingva ebleco havas koston similan al la unua, sed kun pli granda egaleco. Tamen ĝi konsideras, ke ĝi lamas pro « ĉioma malstabileco » kaj ke ĝi postulas konsiderindan kvanton da rimedoj por efektiviĝi ĝin.

La tria ebleco, esperanto kiel sola interna laborlingvo, aperas, kun granda diferenco, kiel la plej malmultekosta kaj egaleca. La ŝparojn oni sukcesus per du vojoj. Unuflanke, la simpleco de esperanto permesus malpli investi en la instruado de fremdaj lingvoj, – kvankam la studo antaŭvidas la lernadon de dua fremda lingvo en la lernejoj de ĉiuj membroŝtatoj, inkluzive de la Unuiĝinta Reĝlando kaj, de alia flanko, ĉar ĝi estas nenies lingvo, la varojn kaj servojn ligitajn al ĝia instruado oni povus egale produkti en ĉiuj landoj, kio kreus valoron en ĉiuj.

Profesoro Grin mallonge analizas ankaŭ la realigeblon de ĉi tiu tria ebleco, kiun li konsideras « neefektivegebla en mallonga tempo », sed ebla en la daŭro de unu generacio. « 85% de la loĝantaro de la Eŭropo de la 25 havas en tio rektan kaj evidentan intereson, sendepende de la kulturaj kaj politikaj riskoj kuntrenataj de la lingva hegemonio », li asertas.

Kataluna Esperanto-Asocio

La dosieron eblas elsxuti el: http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf

Biografiaj notoj pri prof. Grin: www.geneve.ch/sred/collaborateurs/pagesperso/d-h/grinfrancois/francoisgrin.html

Unua televidkanalo en Esperanto premieras en interreto

El ITV

Kiam la entreprenisto Flavio Rebelo, el la urbo São Paulo, Brazilo, diris al la mondo, ke li lanĉos televidkanalon tute en la lingvo Esperanto, liaj konatoj diris al li, ke li freneziĝas. Sed ekde la lasta sabato (la 5^{an} de novembro), la unua televidkanalo en Esperanto – Internacia Televido – estas spektebla de retuzantoj en la tuta mondo.

Internacia Televido estas la unua interreta televido kun tutmonda publiko. La televidkanalo prezentas variajn programojn, uzante la teknologion de radio, televido kaj interreto. Inter la programoj de Internacia Televido estas ĵurnalismo, dokumentarioj, intervjuoj, muziko, kino, ekzotaj kulturoj kaj turismo. En ĝia retejo (<http://internacia.tv>), eblas havi informojn en pluraj lingvoj pri la televidkanalo kaj pri la lingvo Esperanto.

La televidkanalo en Esperanto estas rezulto de du-jara projekto, farita de brazila entrepreno CIDKON, kiu ankaŭ administras la plej grandan interretan portalon en la lingvo Esperanto – Gxangalo.com. Kun dekoj da kanaloj, pli ol 100 mil vizitantoj monate kaj pli ol 2 milionoj kaj duono da paĝlegoj, Gxangalo.com malfermis em interreto la vojon por profesiaj servoj en la

lingvo Esperanto. La portalo estas aktualigita ĉiutage kun noticoj el la tuta mondo, artikoloj, videoj, blogoj, videoludoj, fotoblogoj kaj forumoj, ĉio en la lingvo Esperanto.

Esperanto estas nuntempe lingvo plene disvolviĝinta, kun aktiva komunumo tutmonda, kiu pli kaj pli uzas interreton kiel sian ĉefan komunikilon por amikeco kaj negocoj. Ekzistas sufiĉe granda kvanto da parolantoj de Esperanto en Eŭropo, kaj en landoj tiel malsamaj, kiel Ĉinio, Brazilo, Rusio, Usono, Japanio kaj Irano, inter multaj aliaj. Esperanto estas libere uzata de retuzantoj per programoj kiel ICQ, IRC kaj PalTalk, kaj la retejoj en Esperanto kalkuliĝas je centmiloj.

Inter la parolantoj de Esperanto, estas ofte menciitaj de la internacia gazetaro la Nobel-premiito pri Ekonomio Reinhard Selten; la tutmonda ĉampionino pri ŝako en 1996 Zsuzsa Polgár; kaj Tivadar Soros, patro de la megainvestanto George Soros. La tutmonde konata itala verkisto Umberto Eco subtenas publike la uzadon de Esperanto kadre de Eŭropa Unio, kaj eĉ verkis libron pri la temo, kun la titolo « Serĉe de la Perfekta Lingvo ».

La entreprenisto Flavio Rebelo,

ĉefdirektoro de CIDKON, estas plenfida pri la perspektivoj de siaj negocoj en Esperanto. Kun sia portalo Gxangalo.com, kaj nun kun la televidkanalo, la brazilano diras, ke la respondo de la merkato superis tion, kion li atendis. « Estas merkato por servoj en Esperanto en interreto, kiu konsistas el miloj kaj miloj da homoj el pluraj landoj. Kaj ni ekokupas ĉi tiun niĉon de merkato ».

« Estas la renesanco de Esperanto, kiel internacia lingvo, pere de interreto », diras Flavio Rebelo, « La lingvo, post pluraj jaroj da stagneco, revenas nun al rapida disvastigado dank'al miloj kaj miloj da junaj retuzantoj, kiuj lernas ĝin rekte en interreto. Temas preskaŭ pri 'paralela mondo', en kiu la tutmondiĝo okazas laŭ persona nivelo. La problemo estis tio, ke estis malfacile por tiuj, kiuj ne konis la lingvon, vidi kia estas ĉi tiu mondo, kiu funkcias en Esperanto. La portalo Gxangalo.com, kaj nun Internacia Televido, la televidkanalo en Esperanto, ŝanĝis ĉion ĉi ».

Vizitis nin!

Normand Fleury

Nous avons eu le plaisir d'accueillir dernièrement deux espérantophones. Christophe Chazarein de Toulouse (France) jeune archéologue qui est venu visiter une amie qui poursuit ses études à l'UdeM. Il a particulièrement apprécié la gentillesse des Montréalais. Il a aussi fait un détour par Québec et Trois-Rivières et j'aimerais remercier Raymond, Marie et Jonathan de l'avoir hébergé. Mme Marie Thierry (Paris) a assisté à la rencontre du club à Montréal à la fin octobre. Son défunt mari est le traducteur de la méthode d'Assimil, l'espéranto sans peine.

Eblas uzi esperanton en pli ol cent landoj en la mondo. Foje mi aŭdas de iu ke li ne povas multe vojaĝi. Mi ja komprenas ke tio kostas foje multe sed ĉu vi scias ke regule vizitas Montrealon, eksterlandaj esperantistoj? Do, jen okazo pratiki esperanton komforte sen forvojaĝi.

Mi prezentu al vi la 2 lastajn vizitantojn cxe la montreala esperanto-domo (MEDO). Mi invitas la aliajn gastigantojn de Pasporta Servo en Kebekio informi nin pri viaj gastoj kaj kial ne, sendu mallongan raporton pri ili.

Christophe Chazarein, juna Franco el Tuluzo venis en

Montrealon por viziti amikinson, Présence kiu nuntempe studas ĉe Montrela Universitato. Kristoforo estas arkeologo sed momente ne trovis laboron en tiu fako kaj ne vere certas ĉu li ŝatus labori en tiu fako. Aŭtune li rikoltis vinberojn en bordoza regiono kaj per la gajnita mono decidis veni viziti Kebekion. Mi konatiĝis kun li dum la pasinta internacia junulara kongreso (IJK) en Zakopane, Pollando. Lia impreso pri Montrealo estis tre pozitiva malgraŭ la pluvo kaj pluvego. Laŭ li, la Kebekianoj estas tre simpatiaj kaj helpemaj. Li diris « kiam mi petis vojon surstrate, la homoj plezure respondis al mi ». Krom Montrealon, li vizitis Kebekon kaj Tririveron kaj mi volas danki Raymond Skilling kaj Jonathan Roy kiuj akceptis gastoj lin malgraŭ ili ne estas en Pasporta Servo.

Dua vizitanto estis S-ino Marie Thierry (el Parizo) kiu venis viziti filinon. S-ino Thierry estis en Montrealo antaŭ 14 jaroj kun sia edzo kiu bedaŭrinde mortis intertempe. S-ro Thierry famas kiel e-tradukisto ekzemple de la lernlibro Assimil, Esperanto sen peno. S-ino Thierry amuze diris ke ŝi ne multe aktivis (tamen ŝi flue parolas E.) en la movado ĉar la edzo aktivis por 2 ! Nun ŝi emus volontuli ĉe la oficejo de Esperanto-France en Parizo por okupi ŝin dum emeritiĝo.

Nova estraro (sekvo)

Société québécoise d'espéranto (ESK) pour le mandat de septembre 2005 à septembre 2007 a été élu lors de l'assemblée annuelle des membres, le 9 septembre 2005.

Les postes ont été distribués lors de la première rencontre du nouveau conseil, le 10 octobre 2005. Le nouveau conseil d'administration est formé de: Normand Fleury, président; Martin Benoit vice-président; Sylvain Auclair, trésorier; Boris-Antoine Legault, secrétaire; et Vincent Riendeau, conseiller. De plus, Jérôme Frédéric Bouchard demeure rédacteur en chef du bulletin d'information « La Riverego », et Jessy LaPointe, correcteur des cours internet.

Belarta konkurso?

Boris-Antoine Legault

ESK starigas belartan konkurseton, kaj kuraĝigas siajn membrojn sendi esperantajn verkojn (novel-etojn, poemojn, ktp) por aperigo en ontaj numeroj de « La Riverego ». Ni celas publikigi po unu verkon numere; kompreneble la redaktoro eble devos mallongigi la verkojn (aŭ eĉ povus rifuzi ilin pro troa polemikeco). La prestiĝo havi sian tekston aperitan en la plej grandan kebekian gazeton el Kebekio estos ja interesa « premio », kaj eĉ espereble por kelkaj el niaj lokaj esperantistoj unua paŝo al iom post ioma famiĝo kaj literatura kariero en Esperantio!

Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
lun. 12 ^a dec. 2005	Babilvespero	19 h	Babilvespero
sab. 17 ^a dec. 2005	Botanika Ĝardeno †	18 h	Decembra festo kaj komuna bufedo
lun. 9 ^a jan. 2006	Commensal *	19h	Babilvespero
ven. 27 ^a jan. 2006	MEDO **	20 h	Lingvoj, kio bonas kaj malbonas en la konataj lingvoj de vi?
lun. 13 ^a feb. 2006	Commensal	19 h	Babilvespero
ven. 24 ^a feb. 2006	MEDO **	20 h	Sporto, ĉu vi estas sportema ?

* **Commensal** : 1720, rue Saint-Denis, 845-2627, métro Berri-UQAM

18h *Libervola alveno por manĝo.*

Souper libre

19h *Amika babilado sen fiksita temo.*

Discussion amicale sans thématique

** **Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**: 6358-A rue de Bordeaux, Montréal

Entre Papineau et De Lorimier.

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : www.esperanto.qc.ca

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro - pruntado kaj - aĉetado, aliĝo al ESK.*

Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

† **Botanika Ĝardeno (Jardin Botanique)** : 4101, rue Sherbrooke Est, Montréal

Métro Pie-IX, stationnement gratuit

ENTREZ PAR LES SERRES, derrière le bâtiment administratif.

Por komentoj, proponoj, demandoj : informo@esperanto.qc.ca



*Esperanto-klubo ĉe Mc-Gill Univer-
sitato.*

(maldekstre dekstren):

*Alex Fritz, Fannie St-Pierre-Tanguay,
Chet More, Leonid Chindelevitch,
Vladimir Kalashnikov, Alina Levtova
kaj Ruben Martins*